# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 4 Aprilo, 2015





*Kara Leganto, antaŭ viaj okuloj aperis 125-a sinsekva monata numero de nia ŝatata (mi esperas) bulteno SALUTON! Kiel kutime, la redakcio penis fari ĉion eblan, por ĉi eldono estu riĉenhava kaj interesa por vi.Dokomence, nia nova membro Amy sin prezentas.*

*Grava novaĵo atingis nin de Volina provinca (Ukrainio), kie estis inaŭgurita la plej unua universitatnivela E-centro en Ukrainio.La loka universitato portas nomon de Lesja Ukrainka – la plej populara poetino de ukraina literaturo, kie kreskis inter volinaj lagoj kaj arbaroj.*

*Fine de la numero estas prezentataj interesaj kaj utilaj faktoj el E-movado. Ĝuu!* –La Redakcio

## Prezentado



Saluton. Mi estas Amy. Mi naskiĝis en Greenwood, SK kaj studis en Universitato Lander, Sudkarolino, finite ĝin kun titolo de Bakalaŭro en biologio. Nun mi laboras en besta malsanulejo en Ĉikago.

Mi unue eksciis pri Esperanto kiam mi estis dektri jarojn aĝa, esplorante por klasa raporto. Mi lernis pri artefaritaj lingvoj en libro de Mario Pei. Li donis la alfabeton kaj dekses regulojn de gramatiko. Ĝi estis tiel simpla kaj tiel sensoplena ke mi iĝis tuj konvertita. Mi lernis pri la nacia esperanto ascio de Korodimuna Ŝtala Rato serio de Harry Harrison. Mi ĉiam ŝatis lingvojn, sed mi simple ne estis bona je ili: malbona akcento, malbona memoro. Sed mi ŝiam ŝatis Esperanton, ĉar mi kredas je ĝi, mi kredas je D-ro Zamenhof. –*Amy Aleksander*

## 2014 UEA Membra Statistiko

En la aprila numero de la revuo "Esperanto" aperis la oficiala statistiko pri la membraro de UEA en 2014. Laŭ ĝi estis entute 5027 individuaj membroj, t.e. 124 pli multe ol en 2013. Plej multe da individuaj membroj liveris Germanio (462), Brazilo (454), Francio (429), Japanio (326), Usono (269) kaj Nederlando (206). La plej granda kresko okazis en Brazilo (+77), evidente dank' al la UK en la njbara lando.

La aligitaj membroj – t.e. tiuj membroj de la landaj asocioj, kiuj ne estis samtempe individuaj membroj de UEA – nombris 9789 (-230). Sekve la tuta membraro de UEA, kiu konsistas el la individuaj kaj aligitaj membroj kune, estis 14816 (-106).

449 individuaj membroj de UEA estis samtempe individuaj membroj de ĝia junulara sekcio TEJO. La revuo Esperanto havis 2898 pagitajn abonojn (-70) kaj la junulara revuo Kontakto 690 (+89).

## Nova Universitata E-centro

La 3-an de Aprilo en Orieteŭropa Nacia Universitato nome de Lesja Ukrainka (Ukrainio) estis solene inaŭgurita unika E-centro. Ĝi funkcios ĉe la katedro pri romanidaj lingvoj kaj interlingvistiko. La evento okazis enkadre de la festa semajno de Instituto pri fremdaj lingvoj. En la instituto jam funkcias araba, germana, franca, kanada kaj sveda centroj, kiuj okupiĝas pri iliaj lingvoj kaj kulturoj. Espereble, ke la E-centro okupos gravan lokon inter nomitaj centroj. Dume ĝi estas unusola universitata E-centro en Ukrainio.

La solenaĵon en la granda salono komencis d-rino Nina Daniluk, katedrestrino pri romanidaj lingvoj kaj interlingvistiko, kiu rakontis pri taskoj de la E-centro: prezento de la speciala kurso por studentoj pri interlingvistiko, organizo de la E-kursoj kun certigilo de universitata nivelo laŭ eŭropa referencskalo, "la rondaj diskuttabloj", sciencaj konferencoj, renkontiĝoj de E-istoj, kunsidoj de la urba E-klubo "Arbara kanto" k.t.p.

La partoprenantojn salutis la unua vicerektoro kaj profesoroj de la universitato, prezidanto de la UkrEA, venis satulojn de vicprezidanto de UEA Stefan MacGill, prezidantino de ILEI Mireille Grosjean, estro de ukraina, belorusa kaj E-kolekto en Brita biblioteko Olga Kerziouk, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj, prezidanto de la Esperanto Societo de Ŝikago k.a. Poste sonis originala E-muziko kaj E-kantoj: originalaj kaj tradukitaj. La evento allogis ĵurnalistoj de tutnaciaj kaj lokaj amaskomunikiloj.

P.S. Novkreita E-centro petas ĉiujn dezirantojn kontribui al la E-biblioteko (kontaktadreso subas). Koran dankon! *–Inf. D-rino Nina Daniluk, nina.danylyuk@gmail.com*



# Lesja Ukrainka (1871-1913)



Larisa Kosaĉ-Kvitka, monde konata kiel Lesja Ukrainka, estis granda ukrainia verkistino, kiu apartenas al tri „balenoj" (kune kun Taras' Ŝevĉenko kaj Ivan Franko) de la ukraina poezio. Ŝi speciale elektis tiun plumnomon por montri sian nacian apartenecon kaj deziron batali por libero de ukraina popolo. Lesja Ukrainka pasigis sian infanecon kaj junecon en Volinio. Oni diras, ke ŝi konis pli ol 10 lingvojn, tradukis el la germana, franca, itala, angla, rusa kaj aliaj lingvoj. La amplekso de socia agado kaj verkado de Lesja Ukrainka estis rimarkinda. Ŝia poezio sin nutris per sukoj de ŝia denaska grundo kaj ukraina folkloro, naciaj spiritaj trezoroj. Samtempe ŝi kuraĝe malkovris la vastecon de la monda kulturo. Ŝiaj poemoj, dramoj, liriko, tradukoj havas grandan artan k socian valoron. Ivan Franko tute prave alte pritaksis la agadon de Lesja Ukrainka, skribinte: "De la tempo de Ŝevĉenka Testamento, Ukrainio ne aŭdis tian ardan poezian vorton kiel el la buŝo de ĉi tiu malforta, malsana junulino". Nur malgranda parto de la verkoj de Lesja Ukrainka estis tradukitaj esperantigita kaj aperis en modesta libreto "Liriko" (1971). Nun estas proponataj du poemetoj el la ciklo Kantoj el tombejo (30.IV.1905), tradukitaj lastatempe.

* * * * * * * * * * * * * *

Sur la tombejo mi kuŝis en ombro,
kantis ĉirkaŭe silento entomba,
kantis: "Ekdormu! – entomba silent'. -
Sonĝu feliĉon sen pen'."

Dormi? Ho, dormas la beb' en lulkorbo,
dormas mortinto trankvile en tombo,
se nemortinto troviĝas en tomb',
ĉu tio estas la dorm'?..

* * * * * * * * * * * * * *

Sur la tombejo pri feliĉo ni parolis,
kaj falis vortoj, kaj animon kovris
sinceraj vortoj kvazaŭ foliar'. . .

Kaj ŝanceliĝis en malgaj' herbar',
kaj ŝajne ĉiuj tomboj kaŝi volis,
ke tiam pri feliĉ' malkaŝe ni parolis...

*–Elukrainigis Petro Palyvoda*

# Gravaj Helpiloj

– Ĉi-sube estas kopiita referenco al listo de e-bibliotekoj en Reto. Esperas, ke la informo estos utila por legemuloj kaj unuavice por komencantoj: ja ilia progreso forte dependas de ilia legemo: http://eo.wikibooks.org/wiki/Katalogo_de_Esperanta_retenhavo/Literaturo/Bibliotekoj_kaj_literaturaj_kolektoj

– Printempo jam komencighis! Ne prokrastu vian alighon al la studperiodo kiu permesas al vi lerni efike Esperanton, kaj prepari vin por intershanghi kontentige kun la multaj eksterlandanoj kiuj vi renkontos en Lille somere. Ni provos trejni vin por diskuti, debati, ktp... por ghui plene Universalan Kongreson. Ech se vi ne intencas partopreni UKon, vi certe volos uzi Esperanton dum internacia renkontigho chu ne? Vizitu http://gresillon.org/spip.php?rubrique20&lang=eo kaj alighu aù por la studperiodo aù por la ekzameno KER.

– Laŭ tiu-ĉi adreso troviĝas paĝaro de Radioprelegoj (Verkaro de Claude Gacond). Tio estas arkivo de radio-elsendoj, faritaj dum 31 jaro! Al mi ŝajnas, ke tiu arkivo estas nepre uzenda fare de komencantoj kaj progresantoj. Do, aŭskultu kaj aŭskultigu: http://www.esperanto-gacond.ch/radioprelegoj.html




## Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Randy Ream
1835 N. Natoma Ave.
Chicago, IL 60707
773-262-7738
www.esperanto-chicago.org

## Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Randy Ream
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

## KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Cobbler Square Loft Apts.**
**1350 N. Wells St., Chicago, IL**
**Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t.**

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

**28an de Aprilo** – Tony Marsh parolos pri sia originala metodo de lingva instruado.

**26an de Majo** – Temo estos anoncata

**28an de Junio** – Tradicia kluba pikniko

Sekvantaj aprila kaj maja kunsidoj okazos laŭ la adreso: 1350 N. Wells St., Ŝikago. Bonvenon! Apudas stacioj: Sedgwick (Bruna linio) kaj Clark/ Division (Ruĝa linio). Por senpaga parkejo bv telefoni al Viktoro laŭ la numero (773) 344-2276. Vi rajtas preni vian ŝatatajn ne-E-amikojn, manĝaĵojn kaj trinkaĵojn (dolĉakvon, bieron, vinon ktp).